# Trejnilo de Esperanta Leksiko

Kompilo kaj metodika prilaboro: Ryszard Rokicki

## TESTO 6

**Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

1. Laŭ la ␣ r ␣ ␣ t ␣ oni arbon ekkonas.
2. Oni ␣ ␣ n ␣ ␣ l ␣ ␣ kaj konsolas, sed helpi ne volas.
3. Eĉ plej ruza vulpo en kaptilon ␣ ␣ l ␣ ␣.
4. Kien kudrilo iras, tien fadenon ĝi ␣ ␣ r ␣ ␣.
5. Kiu s ␣ r ␣ ␣ ␣ marcipanon, perdas sian panon.
6. Vere mi estis juna, ␣ r ␣ ŭ ␣ ␣, sed mi havis fianĉinon, kiu loĝis kaj studis en Sofio.
7. Ĉu en via lando ␣ ␣ n ␣ ␣ ␣ pano, ke vi tiel malproksime venis ĝin serĉi?
8. La ruĝo ne estis la suno, sed la lumo de incendioj, la tuta urbo ŝajnis ␣ r ␣ l ␣.
9. La plej aĝa ␣ ␣ l ␣ de Wolfgang kaj Irma estas lerta ledaĵisto.
10. Farse estas, ke Anderton instigis novan leĝon elparlamentigi deputitojn, kiuj ␣ ␣ s ␣ ␣ sian partion.

**Ekzerco 2**. Finskribu ĝustan vorton.

1. Herberto fariĝis gardisto en la Muzeo de Navigado, kie li pasigadas longajn tagojn, ofte s ␣ ␣ ␣.
2. Oni m ␣ r ␣ ␣, ke kontraŭuloj de la eŭro turnis sin al Hitlero.
3. Jam Thomas Hobbes r ␣ m ␣ r ␣ ␣ ␣, ke karakteriza eco de la tuta homa historio estas daŭra milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj.
4. Ferdinand de Saussure estis f ␣ ␣ ␣ ␣ de René de Saussure, tre grava kontribuanto al esperantologio kaj kreinto de la “Principo de neceso kaj sufiĉo”.
5. Precipe ofte malpuriĝas la f ␣ n ␣ ␣ ␣ ␣ ĉe pli junaj infanoj, pro neĝusta uzado de necesejpapero kaj forgeso pri la neceso lavi la manojn poste.
6. Apartan lokon, inter la verkoj de Roerich, **o ␣ ␣ p ␣ ␣** la pentraĵo Malico.
7. La poeto sin t ␣ r ␣ ␣ ␣ al mortinta junulineto, imagante ŝin ankoraŭ vivanta ĉe vivo malsama ol tiu mortula.
8. Ĉu vi dormas? – li demandis **f ␣ ␣ s ␣ ␣ ␣.**
9. Helikmortigado iĝis centra **p ␣ r ␣ ␣** de niaj ĝardenaj laboroj.
10. En aŭtuno 2001 Masayuki planas seminarion por i ␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ i ␣ ␣ ␣ terapiistoj.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

flor', kapt', silent', plend', ordon', paper', hel', vagon', lac', ĉapel'

1. En la historio de la E-movado en nia urbo, samkiel en nia lando, klare distingeblas periodoj de progreso kaj stagno, ␣ ␣ s ␣ ␣ ␣ r ␣ kaj plentrankviliĝo.
2. La mono disiĝis tre baldaŭ por novaj robo, ␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ t ␣ kaj rubandoj.
3. Nia historio estas konservata en multnombraj fotoalbumoj kaj ␣ ␣ p ␣ ␣ u ␣ ␣ ␣.
4. Ĉirkaŭ Manĉestro mankas aŭtomata trajnbremsado taŭga por la plej rapidaj ␣ ␣ g ␣ ␣ ␣ r ␣ ␣.
5. Certe estas ␣ ␣ **c** ␣ g ␣ nombri de unu al mil.
6. Estis ja vintro kaj la noktoj estis sufiĉe ␣ ␣ l ␣ ␣ l ␣ ␣.
7. Finnoj ĝuas la reputacion esti la plej ␣ ␣ ␣ ␣ **n** ␣ ␣ **m** ␣ ␣ inter la eŭropaj popoloj.
8. La proporcio de irlandanoj, kiuj komprenis lingvojn kiel la francan, la germanan aŭ la hispanan, estis (kaj estas) ␣ ␣ ␣ n ␣ ␣ n ␣ ␣ malgranda.
9. Marta sensuspekte falis en insidan ␣ ␣ p ␣ ␣ l ␣ ␣.
10. Vera amo ne estas posedema, malpermesema, ␣ ␣ d ␣ ␣ ␣ m ␣ amo.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

1. La ___ de la ofta kronika fluado de hepatito C eble estas ligitaj kun alta mutaciemo de la viruso.
   a. kolektoj b. kaŭzoj c. bestoj d. doloroj
2. En ___ Katarina ofte vojaĝas, sed nun estas aŭtuno kaj la suno ne brilas.
   a. kutimo b. nubo c. speco d. somero
3. La rostita pano krakis sub liaj ___.
   a. seĝoj b. **dent**oj c. printempoj d. stratoj
4. Li ekspoziciis siajn verkojn enkadre de la artisma ___ ĉirkaŭ la rusa avangarda pentristo Vasilij Kandinskij.
   a. rondo b. pluvo c. neĝo d. linio
5. Same okazas pri la elektoj de ŝtatprezidanto: ĝis nun ne eblis pensi pri ___ "dekstra" kandidato.
   a. fajra b. kolekta c. komuna d. diversa
6. Tamen granda parto de la loĝantaro, ___ la kampara bienista komunumo, restas konservativa kaj fervore religia.
   a. diverse b. gaje c. precipe d. fremde
7. Mi afable demandas de ŝi, kial ŝi ___: ŝi nur pli laŭte singultas.
   a. konsentas b. forgesas c. batalas d. ploras
8. Iuj strebas ___ la stabilecon kaj dividi homojn laŭ principo "sia/fremda".
   a. rompi b. konsenti c. plendi d. veki
9. Kelkajn tagojn aŭ semajnojn poste la ordinaraj akciuloj ___ teruran perdon pro falinta kurzo.
   a. vendos b. suferos c. tranĉos d. penos
10. La maljunulo ___ malgraŭ sia blindeco retrovi tiun lokon.
   a. ripozis b. kuiris c. esperis d. ploris